

MALAGASIO : KOMPLIKA SITUACIO

Ravalomanana, riĉa agroindustriisto mastrumis la landon kvazaŭ sian propran industrion tamen lia decido aĉeti por si prezidentan aviadilon Boeing 737 malkontentigis la Mondan Bankon, kiu tuj poste ĉesis tutan finanĉan helpon al la Granda Insulo. Al tio aldoniĝis lia sekreta kontrakto kun iu sudkorea firmao vendi vastan grundpecon cele al kultivado de maizo. Tiu lasta motivis la fortan reagon de la opozicio, kiu vidis en Andry Rajoelina, tiama urbestro de la ĉefurbo, la sukcesonton de Ravalomanana. Miloj da homoj manifestaciis ĉiutage en la historia placo 13a de majo kaj provis sukcese akriĝi la malamon de la laciĝanta popolo kontraŭ la tiama prezidento. Kaj anstataŭ mildigi la situacion, Ravalomanana fiere tro uzis la armeon por subpremi la manifestaciantojn kaj enkarcerigis multajn politikistojn. Li mem devis transdoni la povon al kelkaj oficiroj, tiel devojiĝinte de la konstitucio, kaj ekzilis sin en SudAfriko ĝis nun. Siavice la oficiroj transdonis al Andry Rajoelina la povon, tiu juna estro de reklama firmao starigas la transiran reĝimon sed tro daŭras la transiro dum pli kaj pli suferas la popolo. Post tri jaroj de transira periodo, 2/3 de la enloĝantoj jam vivas sub la limo de la profunda malriĉeco.

ARMEO ELIRAS LA KAZERNON

Jam dum la socialisma reĝimo (1975-1991), la armeo perdis sian virgan neŭtralecon, oficiroj kaj suboficiroj apartenis al politika partio. Premo far la armeo devigis Ravalomanana demisii kaj eĉ forfuĝi al SudAfriko. Ŝajnas ke, kvankam Ravalomanana deziregas reiri hejmen, parto de la armeo minace baras al li la vojon. Evidentiĝas ke la situacio ne malplaĉas al la nuna transirperioda prezidento, kiu multobligas favoron kaj promociojn al la anoj de la armeo, ĝendarmoj kaj polico.

FIPOLITIKISTOJ PROFITAS

La samaj kapoj denove regas en la kortego. Ne mirinde se kelkaj samaj familianoj estis nomumitaj konsilantoj de la transira reĝimo (kiuj rolas kiel deputitoj kaj senatanoj) kaj ricevas altan pagon. Sekve, ne ĉiuj trovas profiton el la solviĝo de la nuna situacio kaj kaŝe faras ĉion por plu daŭrigi la transiran periodon. Des pli ke alta posteno helpas manovri por diversaj kontrabandoj. Kiom da fojoj ja estis malkovritaj ŝarĝaŭtoj kaj ŝipoj, kiuj transportas valorajn lignaĵojn al Ĉinio ? Sed ĝis nun, la « cerboj » de tiaj aferoj neniam estis arestitaj aŭ eĉ nur maltrankviligitaj. Koruptado obliĝas je ĉiuj niveloj.

ENMIKSO FAR IUJ POTENCAJ LANDOJ

Kvankam oni ne rekte mencias la nomojn de potencaj landoj, ĉiuj Malagasoj ekkomprenas kiu lando apogas kaj protektas kiun gravulon. Bedaŭrinde, iuj landoj faras ĉion eblan por akiri pecon el tiaj riĉaĵoj. La samo ja jam okazis en Afganio, Irako kaj Irano ktp. Post kvin jaroj, eblas ekspluati la petrolon sub la malagasa grundo. Ni iĝas la vetaĵo de ĉiuj industriaj landoj kaj ili sentime enmiksiĝas en la internan krizon, kiu persistadas en la Granda Insulo. La t.n. internacia komunumo diktas siajn leĝojn al la nuna

reĝimo, oni rajtas timi ke fremdajn armeojn eniros tien ĉi pretende al repacigo okaze de iu "provokota" interna milito.

TUJ VIDEBLAS LA SENSEKURECO

Aŭdiĝas atakoj tie kaj ie en la granda urbo kaj altiĝas la nombro de viktimoj pri poŝtoŝtelistoj. Dum en la kamparo, la « dahalo » (organizita bando de bovŝtelistoj) detruas la kamparan komunumon raziante tutan teritorion. Ĝendarmoj kaj armeoj estas nun devigataj uzi helikopterojn por batali kontraŭ tiajn ŝtelistojn. Pro la sinsekvaj politikaj kri-



Tia ŝajna vivnormalaĵo kaŝas daŭran timon pri la estonteco. La simpla civitano havas la impreson ke li ne plu regas sian vivon

zoj en 1991, 2002 kaj 2009, armiloj estas nelice dissemi-taj en la lando, bandit-atakoj ofte plenumiĝas kun la kona-ta komunisma fusilo mitrala Kalachnikov.

SERĈI ELIRVOJON

Ĉiuj konscias pri la urĝa neceso okazigi balotadon. La internacia komunumo helpas la landon prepari presiden-tan elekton kaj jam anonciĝis diversaj datoj sed pro neakordigebla pozicio de la lokaj politikistoj (kiu estas esence duflanka : la partianoj de Ravalomanana kaj tiuj de Rajoelina), la balotado suferadas oftan prokrastigon.

SENPOVECO KAJ REZIGNACIO

Ne eblas al simpla civitano diri ion ajn ĉar kiu ja emas aŭskulti lin ? La simpla homo estas naŭzita de politiko. La ĝenerala opinio disdubiĝas konforme al la pozicio de tiuj politikistoj. Kaj la pensmaniero de Malagasoj ne helpas, oni facile rezignacias kaj provas elteni tiom longe kiom oni vivas. Feliĉe ke Malagasoj estas religiema popolo, kiu kapablas eltiri el sia fido la forton alfronti tian situacion.

LA VIVO EN NIAJ GRANDAJ URBOJ

RENOVIGO DE LA BUSOJ EN ANTANANARIVO

Februare delegitoj de sindikatoj de busistoj en Antananarivo estis senditaj al Ĉinio por trakti kun ĉinaj busetkonstruistoj cele al renovigo de la ĉefurbaj veturiloj.

Oni ja konstatas ke jam oldegas la busoj de la ĉefurbo malgraŭ la alveno de belaj germanaj aŭtoj *Mercedes Benz Sprinter*. La ĝisnunaj busetoj povas entute transporti nur 25 sidantajn pasaĝerojn kaj ĉe la bushaltejo, kvar aŭ kvin el tiaj aŭtoj samtempe staras kaj provokas monstran trafikŝtopiĝon. Krome, tiuj malnovegaj aŭtoj poluadas la urbon kaj des malplibone alportas preskaŭ ĉiutage trafikakcidentojn. Pro altiĝo de karburado kaj de aŭtopecaroj, la sindikato devis altiĝi la buskoston de Ar 300 al Ar 400 (egalvaloro de unuhora laborkosto ĉe malaltklasa laboristo) sed la nuna registaro rifuzas tian decidon.

Jam delonge la sindikato petis de la registaro starigon de iu centro, kie la membroj rajtas aĉeti avantaĝkoste aŭtopecaron. Sed neniu respondis al ilia peto. Kaj nun, post multaj interkonsiliĝoj, sindikato kaj registaro interkonsentis pri la nova maniero enporti novajn busetojn cele al renovigo de la busoj en la ĉefurbo. Kaj akriĝas la veturad-problemoj tiel, ke la registaro decidis kunlabori kun la profesiuloj de pasaĝer-transportado.



Tro da busetoj montras la amatorecon de transportistoj de niaj grandaj urboj

Siaflanke, la registaro disponigis al la membroj de la sindikatoj monsumon ĉe speciala bankkonto por aĉeti novajn busetojn sed estas tasko de tiuj profesiuloj trovi la taŭgan veturilon. Prezavantaĝo diktis elekti ĉinan buseton. Post la vizito ĉe kelkaj fabrikistoj en Ĉinio, estis decidite aĉeti tri malsamajn modelojn, kies ecaro kongruas kun la bezono de la lokaj pasaĝeroj. Temas do pri buseto kiu kapablas transporti tridek sidantajn kaj dek starantajn pasaĝerojn. Tia elekto estis farata komforme al la ofta mallarĝeco de la vojo tra la urbo Antananarivo.

Malgraŭ la entuziasmo montrita de la profesiuloj atendente oktobron, kie alvenos la unua grupo de busetoj, kelkaj transportistoj ja ne tro emas la drakonajn kondiĉojn altruditajn de la registaro. Stariĝos ĝenerala kaso kien ĉiuj membroj devas enmeti la

ĉiutagan enspezon. Tiuj busetoj estos afrankitaj de doganimpostoj. Plie, unuopa buseto kostas proks. Ar 80 milionojn. Dum kvin jaroj, la membro de la sindikato pagos iom post iom parton de tiu kosto sed li/ŝi ne rajtas enkasigi la ĉiutagan enspezon ĝis finpago de la tuta monsumo. Li/ŝi libere disponigas pri sia aŭto nur



Alveno de tiuj belaj germanaj busoj ne solvis la problemon de trafikŝtopiĝo

pliposte laŭ tiu lasta kondiĉo. Tamen, por modernigi la urban bustransportadon, ĉiu profesiulo devas disponigi al tiu nova buseto ŝoforon kaj asistanton, kiuj ricevos sian salajron el la ĝenerala kaso. La dungitoj surmetos sur sin indan kostumon kaj montras respekton kaj afablecon al la pasaĝeroj. Speciala kupono estos eldonita, kiu validas por ĉiuj buslinioj kaj oni vendos ilin en aparta giĉeto. Tiu oferto estas por jama profesiulo kaj la profesion permesilon el la olda buseto uzos la nova.


Tri mil busetoj trairas la ĉefurbon ĉiutage. Ĉu efektive pliboniĝos la proponata servo se la decido restas nedevisa por ĉiuj? Ĉu malaperos la infere ĉiutaga trafikŝtopiĝo kaj kien enmeti tiujn malnovegajn busetojn, kies rajto transporti estos forprenita?



Kiam oni decidos renovigi ankaŭ la malnovajn taksiojn de la ĉefurbo?

MALAGASA KAMPARO

KAŜITA RIĈAĴO DE LA KAMPARO



STEREOTIPE

La malagasanojn kamparanojn daŭre karakterizas profundan malriĉecon. Oni ofte renkontas vilaĝon izolitan pro la malfacila vojo, kiu kondukas tien. La sama situacio estas tuj videbla eĉ je du aŭ tri kilometroj for de Antananarivo. Krome, mankas sana akvo kaj elektro, kio implikas mankon de higieno kaj bonfarto al la kamparanoj. Bazaj infrastrukturoj kiel hospitalo, policejo kaj lernejo ne ĉiam disponeblas aŭ se bonŝance, ili aspektas malnovaj aŭ disfalontaj. Evidentiĝas ke ŝtato-ficistoj ne tro emas resti en la kamparo pro la tiea malfacila vivkondiĉo. Sekve la restantaj bildoj pri la kamparo estas polvo, naŭzaj odoroj, dumnokta malhelo, sensekureco, ruĝkolora grundo, polvo kaj koto, superstiĉoj...



AVANTAĜOJ



Aliflanke, la sperta observanto povas rimarki, malgraŭ tio ĉio, kelkajn pozitivajn trajtojn de nia kamparo. Ĝenerale tre afablaj kaj gastigemaj estas la kamparanoj. Ili modeste vivas kaj senkonscie aplikas modernan metodon por kultivi, ekzemple uzante naturan sterkon anstataŭ ĥemian. Kaj kiom da urbanoj sentas sin liberaj kaj malstreĉitaj dum sia restado en la kamparo, kie senkonteste freŝas la legomoj kaj kvalite spireblas la aero? Kamparanoj daŭre vivas ankaŭ kun la malagasaj tradicioj kaj konservas la sociajn valorojn kiel solidarecon kaj interhelpon en ĉiuj ajn situacio. Kamparo daŭrigas la belajn arĥitekturojn de niaj pragepatroj.



Salde, la tuta riĉaĵo de Malagasoj restas en niaj kamparoj sed bedaŭrinde ne la koncernitaj kamparanoj profitas el siaj lagoj kaj arbaroj, el la subteraj minaĵoj kaj eĉ el siaj propraj rikoltoj.



AL ANALAVORY, LAŬLONGE DE LA NACIA VOJO N°1

Ni uzis nian propran aŭton por iri al Analavory laŭlonge de la nacia vojo N°1. Ĝi estis unu el la fiereco de la reĝimo de la unua respubliko (1960-1972). Normale, ni devis preni « taxi-brousse » (laŭlitere « kampara taksio », tiel nomiĝas tiuj busoj kaj busetoj kiuj laboras ekster la granda urbo) en la stacidomo ĉe Fasan'ny Karana (« la tombo de Hindo » ĉar fronte de la stacidomo staras la kadavrobruligejo de la lokaj Hindopakistanoj) kiu situas iom sude de Anosizato.

Ni trairis sufiĉe belan ŝoseon, kies konstruadon financis Francio. Jen estas la kvartalo Anosibe (« la vasta insulo » probable pro la akvo, kiu inundas la vastan rizkampon el kiu originis tiu kvartalo), kiu famas pro ties granda bazaro. La kamparanoj ja kutimas vendi tie siajn rikoltojn kaj okaze de familiaj eventoj, estas pli avantaĝe veni al Anosibe je la 4a am por sin provizi je bonprezaj legomoj. Ne mankas trafikŝtopiĝo tie pro la multaj ŝarĝaŭtoj, kiuj plenigas la apudan parkejon. Bedaŭrinde, tro da rubaĵoj odoraĉas en Anosibe kaj biciklistoj kaj ĉaretoj sentime trairas la poraŭtan ŝoseon, kio ofte okazigas akcidentojn.



Ni trapasis la ponton de Anosizato, kiu estas la fino de la ĉefurba teritorio. La rivero Ikopa fluas sub tiu ponto kaj tial la nomo de la pluaj municipoj estas « Atsimon-drano », kiu signifas sude la de rivero. Preter la ŝoseo staras bazaroj kun vitrino, en kiu estas pezentataj rostitaj kokinaĵoj kun varma kokina buljono. Sed Anosizato ekperdas sian famon pro forta konkurenco far iu alia kvartalo en la nordo de la ĉefurbo. La nomo Anosizato sgnifas « cento da insuloj » pro apero de insuletoj meze de la rivero Ikopa dum la pluva periodo.

Ni alvenis en Ampitatafika. Rapide konstruiĝas belaj domoj kaj komercaj centroj ambaŭflanke preter tiu nacia vojo. Ni plu iris ĝis iu alia ponto, sub kiu fluas la rivero Sisaony. Tie estas la urbo Ampitatafika (« la loko, kien transiras la armeo », nomo kiu originas el la ekspedicio en la okcidento far la tiaj reĝoj). La urbo staras ĉe alta monteto kaj ne eblas ĝin vidi de la ŝoseo. De tie la nacia vojo paralelas kun la rivero kaj monotone ekaperas kampara pejzaĝo.



Fenoarivo (« la nombro mil estas atingita », probable tie kolektiĝis reĝaj soldatoj antaŭ ol invadi iun alian teritorion) estas konata ĉefe pro sia hospitalo por kuraci tuberkulozulon. Krome, ĝi ekiĝas malgrava pro kreiĝo de alia apuda urbeto Vontovorona, kiu gastas la politeknikan instituton. Kiam ni eliras tiun ĉi urbeton, ekraras la domoj laŭlonge de la nacia vojo.

Ni atingis Ambatomirahavavy-on, dudekon da kilometroj for de Antananarivo kaj tien kutimas aliri miloj da ekskursantoj dum pasko kaj pentekosto. La nomo de la urbo signifas « La du fratinaj ŝtonoj » ĉar estas tie du grandaj ŝtonoj kiuj similas unu la alia.

Poste ni eniris en Imeritsiatosika-n, (« Imerina, kiun oni ne povas forpuŝi », tio signifas ke la soldatoj de Merina - la tribo de la centra altebenaĵo - estis teknike potencaj) ĉi tie komenciĝas la vasta regiono Itasy.



Arivonimamo (45 km) estas tro trankvila loko, tamen historia urbo kie estis murditaj de patriotoj la evangelia pastoro Johnson kun la tuta familio en 1896. Iu unua vojo ebligas tuj preterpasi la urbon dum la dua helpas nin trairi ĝin. Ĉiuokaze, la urbo estas konstruita laŭlonge de la ŝoseo. Arivonimamo famas pro sia « bononoka », temas pri kuirita manioko, kiun oni fermentis sub lageto dum unu semajno ĝis kiam ĝi odoraĉas kiel fromaĝo.

NI VOJAĜAS

Ni fine troviĝis antaŭ la enirejo al Miarinarivo (90 km) (t.e. « kie staras mil », alude al mil soldatoj pretaj por batali). Oni devas supreniri maldestren por trairi la urbon. Temas pri administra urbo, kie troviĝas la sidejo de la regiono. Tie troveblas ankaŭ famaj lernejoj de la tuta « Ambaniandrefana » (t.e. « en la suba okcidento », tiel nomiĝas la vasta regiono de Arivonimamo ĝis Tsiroanimandidy). Marinarivo estis ĉarma urbeto kun ĝia katolika katedralo sed ĝi perdas sian gravecon pro la rapida progreso de Analavory. Alia malavantaĝo estas tiu deviga kurbiĝo al la urbo, for de la nacia vojo, tial ke la vojaĝantoj prefere nur preterpasi la urbon.



Antanetimboahangy (t.e. « la vasta grundo de Voahangy », probable la nomo de iu virino) ne estas urbo sed fakte vilaĝo de gelernantoj ĉar ĝi famas pro sia gimnazio kaj siaj fiaj sorĉist(in)oj, pri kiuj timas la kamparanaj gefiloj devigitaj lerni tie pro manko de alia ebleco. Tamen, Antanetimboahangy posedas dekokilometran rektlinian ŝoseon, tre aprezatan de aŭtaj kaj motorciklaj sportistoj.



Kaj finfine post tri horoj de normalrapideca veturado, ni trafis Analavory-on (120 km) urbeton konstruitan laŭlonge de la nacia vojo. Ĝi tuj rekoneblas pro sia alta monto, kies supro estas surface plata. Urbeto kosmopolita, ties vulkana grundo ege fekundas (tomato, fazeolo, pistaĉo, manioko, rizo...) kaj la enloĝantoj bredas multe da bovoj. Tre palpebla estas la rapidega moderniĝo de tiu urbeto. Ĝi famas ankaŭ pro fiŝoj el la lago Itasy sed ili iĝas multekostaj, la lago Itasy situas dekon da kilometroj for de ĉi tie. Abunde pluvis dum duona horo kiam ni eniris la urbeton. Ni tagmanĝis ĉe iu « hôtely » (tiel Malagasoj no-

mas pagatan manĝejon) akompanitan de rizo. La do sufiĉe altekosta. Analaliaj regionoj.

Meze de la urbeto troviĝas plimulto de veturiloj estas pablas enteni 15 pakostas 5.000 ariary (€ 2), ga pago al nekvalifikita la-Ni alvenis iun mardon, la tuta urbo ĉar la kamparankaŭ ĝi « supreniris » tien ĉi amuziĝi.



kaj mendis frititan fiŝon plado kostas malpli ol € 2, vory estas vojkruciĝo al

la haltejo de la stacidomo, aziaj busetoj kiuj kasaĝerojn kaj la vojaĝo kio egalvaloras al unutaboristo.

bazartagon kaj bruegis la noj el dek kilometroj ĉirpor vendi kaj aĉeti kaj iom

Ni vizitis la lokan gimnazion, kiun viktimas la forta konkurenco far trideko da privataj lernejoj. La gimnaziestro plendis pri la malbona rilato inter la instruistoj kaj la gepatroj.

Kiel impresas al ni tia vojaĝo ?

-la vojo estis konstruita laŭ teknika normo tamen ĝi ekmalbonstatis pro manko de prizorgo.

-la vojaĝo okazis meze de marto dum la pluva periodo : la ĉirkaŭaĵo abundis verdaĵon naturan kaj plantitan sed foje aperis ankaŭ spuro de detruita medio precipe ĉe la montetflankoj.

-multaj ebriuloj vagadas tra la urbeto kaj multe da vendejo de alkoholaĵoj staras ĉie.

-modiĝas la uzado de ĉinaj poŝtelefonoj des pli ke la tri telefonkompanioj (Telma, Airtel kaj Orange) adekvate servas la lokon. Sed ne ĉiam kapteblas la telefonretoj dumvoje.

-ĝojigas tiea restado pro enloĝantoj gastamaj, ni provizumas nin per « voan-dalana » (tradicio estas kunporti por la familio kaj amikoj ion), ni aĉetis varman « koba katsaka » (ian panon faritan el maiza faruno),




RILATE NIAN HISTORION

FRANCIO RIFUZADAS REKONI SIAN RESPONDECON

Kelkaj landoj kiuj agis malbone kontraŭ aliaj landoj ekkoncias nun pri sia kulpo kaj provas publike sin ekskuzi antaŭ la Historio. Jen almenaŭ minimuma kaj simbola gesto por repaciĝi kun si mem sed ne ĉiuj landoj tiel reagis...

La malagasa popolo rememorigis la daton 29a de marto 1947, kie komenciĝis la plej granda ribelado de patriotoj kontraŭ la francaj koloniistoj. Iu franca generalo donis la oficialan ciferon pri la nombro de viktimoj kelkajn monatojn post tiu evento : 100.000 Malagaso-
soj kaj 400 francaj soldatoj. Reeĥiĝis ĝis Eŭropo kaj Ameriko la sovaĝa buĉado farita de francaj soldatoj, kiuj i.a. fiaĵoj enmetis en plurajn vagonojn patriotojn antaŭ ol mitralpafi ilin. Tiam eĉ la franca verkisto kaj filozofa Albert Camus indigniĝis kaj taksis tion simila al la nazia krimo, kiun ĵus travivis liaj samlandanoj. Plimulto de tiuj viktimoj venis de la orienta parto de la insulo, kie varmis la ribelado kaŭze de sklaviga metodo uzita de koloniistoj por devigi la lokanojn planti eksportebajn varojn al Francio. Pli poste kelkaj esploristoj en Francio kontestis tiun ciferon reduktinte la nombron de malagasaj viktimoj al 10.000 homoj. 66 jaroj poste, Francio rifuzas forigi la vualon, kiu surmetas tiun eventon kvankam jam estas jure trapasita la internacia limdato koncerne tiajn aferojn. Dosieroj kiuj povus helpi respondi al diversaj gravaj demandoj daŭre ne alireblas : kiu(j) ekstartis tiun eventon ? Kiu kunlaboris kun kiuj ? Kio estis la ĉefa celo ?



Kelkaj partioj nacionalismaj postulas nun la veron asertante ke ne la Malagaso ekstartis tiun aferon sed la Francoj mem cele al mortigo de la tiama naciisma partio MDRM. Tiu ĉi ja populare akiris majoritaton dum la balotado por reprezenti la koloniitan insulon ĉe la franca asembleo. Francio timis tiun partion kaj serĉis pretekston por detrui ĝin. En 2006, la tiama franca prezidento Jacques Chirac vizitis la Grandan Insulon kaj ĉiuj jam esperis ke li publike rekonos la respondecon de Francio aŭ eĉ petos pardonon. Sed nur simpla aludo pri tia bedaŭrinda parto de la komuna historio li svage faris. Kaj stariĝas la demando kion timas Francio por daŭre kaŝi la veron kaj kiujn ĝi volas protekti.

Sed plej bedaŭrindas la fakto ke la nuna generacio ne scias la historion de sia patrolando, ĝi daŭre imitas blinde tion, kion montras al ĝi la francaj televido, ĝi sezezite uzas la francan Ingvon anstataŭ la malagasan kaj multaj gejunuloj pensas ke migri al Francio estas la solvo por havigi al si pli bonan vivon kaj pli validan studon. Eble pro tio ĉio, Francio ne timas ke iu malhelpos ĝin plu silenti pri la farita krimo.

“Kaj stariĝas la demando kion timas Francio por daŭre kaŝi la veron kaj kiujn ĝi volas protekti.”